# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013
2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj
Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-08 sendita el Budapeŝto la 23an de februaro. Kontrolo el Svislando.

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## Torino: UK 2023 –Michela Lipari intervjuita

Michela Lipari interparolis kun Fernando Maia, vicprezidanto de UEA kaj Orlando Raola, estrarano UEA pri kongresoj pri la Universala Kongreso (UK) en Torino en 2023. Universalaj Kongresoj: kio, kia, kiel? La evento okazis per Zoom kaj nun spekteblas ĉe:

https://youtu.be/JlOXCPtiLug

## Universitata publika agado en Turkio

Kadre de la prezenta serio de "Simpozio pri Kultura Memoro" organizita de Esplorcentro pri Historia kaj Kultura Heredaĵo de la Universitato Hacettepe (HÜTKAM), okazis frue en februaro nformplenaj prezentaĵoj:


- D-ro kaj universitata preleganto s-ino Başak Aray faris prezenton pri "Diskutoj pri Internacia Helplingvo" (ĉefe pri Esperanto)
- D-ro s-ino Pınar Sel faris prezenton pri “La historio de Esperanto en Turkio”.

En la prezento partoprenis preskaŭ 100 homoj, kiuj plejparte estis akademianoj. Ili estis malfermitaj al ĉiuj kaj daŭris preskaŭ 2 horojn en la turka lingvo pere de la platformo *Zoom*.

Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ilei

Redaktoroj:
Stefan MacGill kaj Mirejo Grosjean



ENHAVO

- Torino 2023
- Turka agado
- Azia revuo
- IRIS pionire
- IKEF
- Marsa mesaĝo

# Azia revuo – nova nomo, nova redaktoro

Pretas la numero 110 de '**Esperanto en Azio kaj Oceanio'**, la bulteno de la Azia-Oceania Komisiono de UEA. La numero estas relative mallonga (24-paĝa) kun kontribuoj el 8 landoj en Azio kaj neniu el Oceanio. Ĝi enhavas precipe raportojn pri eventoj okaze de la Zamenhofa Tago kaj en la lastaj 2-3 monatoj de la jaro 2020. La bultenon malfermas la redakcia artikolo titolita '*La jaro 2020 ja estis bona jaro por ni*.'

Klaku tiun ĉi ligilon por legi kaj alŝuti la numeron. Vi povas legi ankaŭ la antaŭajn numerojn ĉe esperantoazia.net/index.php?mid=bulteno.

Mi bonvenigas kontribuojn al la venonta numero (111) ĝis la 28-a de februaro 2021. Detalojn pri la alvoko por kontribuoj vi vidos sur la dorsa kovrilo de la numero. Se vi havas demandojn, sendu privatan mesaĝon al mi (albertstgarrido@gmail.com) aŭ alternative al Nisinaga Atusi (acero@an.email.ne.jp), prezidanto de la Azia-Oceania Komisiono.



Albert Stalin Garrido, Filipinoj
Ĉefredaktoro, Esperanto en Azio kaj Oceanio

# TEJO iris (kaj iros) pionire pri scienco

La komisiono de TEJO pri Edukado, Scienco kaj Kulturo organizas la Internacian Retan Interfakan Simpozion (IRIS) **de la 2-a ĝis la 5-a de aprilo 2021**. La simpozio enhavos videajn prelegojn kaj podiajn diskutojn interalie en la jenaj kampoj: matematiko, fiziko, informadiko, biologio, kemio, medicino, geosciencoj, inĝenierarto, psikologio, edukado, lingvistiko, antropologio, sociologio, historio kaj artoj. La bunta proponita fakaro celas instigi la partoprenantojn pripensi tion, kion ilia fako povas gajni per aldono de novaj interfakaj perspektivoj kaj demandaroj. La simpozio estas organizata de TEJO kun subteno de UEA.

Kiel vi povos partopreni?

1. **Proponu vian prelegon.** La unua paŝo por esti parto de IRIS estas sciigi la organizantojn kiel eble plej baldaŭ pri via intenco partopreni, aŭ pri la temo de via prelego per mallonga resumo (maksimume kvindek vortoj). Povas temi pri specifa aspekto de via fako, aŭ pri via propra esploro kadre de ĝi.
2. **Registru vian prelegon** (de 5 ĝis 15 minutoj). Pro la reta karaktero de la evento, la prelegoj devos esti anticipe registritaj kiel videoj. Bonvolu prepari ankaŭ tekstan priskribon (maksimume 250 vortoj). Vi povos sendi vian kontribuon al iris@tejo.org ĝis la 15-a de marto 2021.
3. **Registru la videon** laŭeble en bona kvalito, en horizontala formato. Antentu ke via voĉo estu bone aŭdebla kaj ke estu sufiĉe da lumo en la ĉambro kie vi registras. Bonvolu esti proksime de la mikrofono, por ke la sonkvalito de via prelego estu alta.
4. **Partoprenu la simpozion**. La podiaj diskutoj pritraktos aspektojn de la diversaj fakoj surbaze de la ricevitaj videaj kontribuoj, kiuj estos publikigitaj en jutubo antaŭ la simpozio. Fine la prelegantoj respondos la demandojn de la publiko.

Se via fako ne troviĝas inter la supre listigitaj, vi povas proponi ĝian aldonon al la organizantoj. Por kontakti la organizan teamon, skribu mesaĝon al iris@tejo.org.




## La internacieco de niaj komercemuloj en IKEF

IKEF (Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio) estas aliĝinta Faka Asocio de UEA, kiu ege kreskigis sian agadon tra la lastaj monatoj. Ili skribas:

“Inter la kritikoj pri Esperanto kiel interlingva kontaktlingvo estas la fakto, ke ĝiaj radikoj laŭdire estas tro eŭropaj. Kiel do klarigi, ke la plenuma komitato de IKEF estas nuntempe prezidata de ĉino kaj ke ĝi konsistas el 3 ĉinoj, 2 sudkoreoj, 2 japanoj, 1 sudafrikano, 1 senegalo, 1 niĝeriano, 1 nepala, 1 mongola, 1 kongola, 1 aŭstralia, 1 argentina?

Vidu detalojn ĉe:

https://www.ikef.info/membroj

Por atentigi pri uzado de Esperanto por komercaj celoj, ĉu ne endus informi (ne nur esperantistojn) pri agadoj de IKEF / Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio?

En ok lingvoj :
- https://www.ikef.info/francais
- https://www.ikef.info/nedellands
- https://www.ikef.info/english
- https://www.ikef.info/deutche
- https://www.ikef.info/espanol
- https://www.ikef.info/japanese
- https://www.ikef.info/koreio
- https://www.ikef.info/china

La retejo de IKEF (www.ikef.info) mem aperas en 12 lingvoj.

IKEF Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio

## La Marsa Esperanto-Asocio (MEA) petas aliĝon al UEA

*Ĉu nia titolo estas iomete antaŭtempa? Argumenteble jes, sed la temo riskas ne plu esti aktuala en la unua de aprilo. Nun ege aktualas, kun tri veturiloj/esploriloj atinginta la ruĝan planedon en la lastaj semajnoj. Ĉu timeble, ke la Komitato de UEA akceptos la peton nur kondiĉe, ke la orbo estu renomumita 'la verda planedo'. Plia dilemo por ili: al kiu regiono de UEA apartenos la nova vere universala Asocio – ĉu Ameriko, Azio aŭ MONA? Ĉu la statuto de MEA adekvatos? Ĉu ili respektos la rajtojn de la indiĝena loĝantaro de la teritorio?*


*Ni rapidas certigi al vi, ke la informoj ekde la sekva alineo estas seriozaj.*

"Pri tiu plej granda kaj kompleksa misio iam sendita de NASA al Marso, videblas mia hieraŭa **prelego** en la jutuba kanalo de ELI, registrita dum la Israela Virtuala Eo-Kunveno, kun demandoj kaj komentoj de la aŭskultantoj, pluraj el eksterlando.

La draman misio-alvenon al Marso indas sekvi **kun E-komentario** en la YouTube kanalo, D-ro Loĉjo registrita du horojn **antaŭ** la planita alveno de *Perseverance* sur la marsa surfaco. Pliaj informoj pri la jutuba kanalo'D-ro Loĉjo' aperos en mia rubriko 'Fake, Science, Profesie tra la mondo' en la marta n-ro de Esperanto.

Amri Wandel, estrarano de UEA pri Faka Agado







Dilemo por UEA: kiu el la tri februaraj alvenoj al la provizore ruĝa planedo: Unue alvenis la ĉina esplorilo Tianwen ('demandoj al la ĉielo'), kiu por nun restas en orbitado, due 'Espero' de Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj (ankaŭ orbitanta) kaj laste 'Persisto' de NASA, kiu ja almarsiĝis. Efektive, persisto kaj espero estas laŭdindaj ecoj por aspiranta asocio de UEA.

============ Vortoj: 960 ===========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝisla fino de 2020. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.